# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

PRIEURE SAINT-MARTIN
77610 LA HOUSSAYE EN BRIE
FRANCE

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★

(Association Catholique Française pour l'Espéranto)



| | | |
|---|---|---|
| Prezidanto: | S-ro A. BESSIERE 20, rue C. Saint-Saëns | 76000 ROUEN |
| Sekr: | F-ino G. PREUX 55, 3 Terrasse Rue du 11 novembre | 59290 WASQUEHAL |
| Kasistino: | S-ino J. VINCENT 26 bis, rue Milngavie | 49150 BAUGE |
| Religia konsilanto: | P-ro L. BOURDON 7, av. Salomon | 59000 LILLE |
| Peranto IKUE: | P-ro R. DEGRELLE 12, r. Estienne d'Orves | 54490 PIENNES |

C.C.P. Association Catholique Française pour l' Esperanto 2 324 93 H ROUEN.



==== la nº: 8 F. Abono: 30 F (TTC). Kotizo: 10 F. Sume: 40 F. ====

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

==== Nº 100 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====

*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***

==== Marto 1994 ====


xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

N.B. La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent n-pre antaŭ la 5-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## LE MOT DU PRESIDENT

A la fin du mois de juillet 1993 s' est tenu à Valence (Espagne) le 78-ème Congrès Universel d' Esperanto. De nombreuses personnalités ont salué ce congrès et apporté leur soutien aux participants. Parmi les nombreux messages reçus, ceux du Pape Jean-Paul II, de M. Boutros Boutros-Ghali, secrétaire général de l' ONU, de M. Federico Mayor Zaragoza, directeur général de l' UNESCO et de M. Camilo José Cela, pris Nobel de littérature ont été particulièrement remarqués et appréciés. Ainsi les plus hautes personnalités du monde ont reconnu la valeur et l' utilité de la Langue Internationale et apporté aux espérantistes leur appui et leur encouragement.

Alors qu' en France, tant de beaux esprits ont un sourire entendu dès que l' on aborde devant eux l' utilité de l' Esperanto, il est encourageant de constater que les dirigeants les plus importants de la terre apprécient nos efforts pour répandre l' usage de l' Esperanto dans les relations internationales. Nous ne pouvons que nous en réjouir et nous trouver confortés dans notre action. L' Esperanto a maintenant plus de 100 ans; il est répandu sur les cinq continents et parlé chaque jour par de plus en plus de personnes. Des livres sont édités, des revues sont diffusées et le monde espérantophone est une réalité que ne peuvent nier que ceux qui se voilent la face pour ne pas voir.

C' est dire que, loin de nous décourager, nous devons continuer à oeuvrer pour propager l' usage de la Langue Internationale, principalement dans les milieux chrétiens et par elle aider à maintenir l' unité de la Paix entre les peuples.

A. BESSIERE

## LA BILETO DE LA PREZIDANTO

Fine de julio 1993, okazis en Valencio (Hispanujo) la 78-a Universala Kongreso de Esperanto. Pluraj eminentuloj salutis ĝin kaj montris sian subtenon al la partoprenantoj. Inter la multaj ricevitaj mesaĝoj, tiujn de Papo Johano-Paŭlo II-a, de S-ro Boutros Boutros-Ghali, ĝenerala sekretario de l' UNO, de Federico Mayor Zaragoza, ĝenerala direktoro de l' UNESKO kaj de S-ro Camilo José Cela, Nobel-premiito pri literaturo, oni aparte rimarkis kaj ŝatis. Tiel la plej altranguloj en la mondo agnoskis la valoron kaj utilon de la Lingvo Internacia kaj alportis al la esperantistoj sian apogon kaj kuraĝigon.

Dum en Francujo, tiom da pedantuloj subridetas, kiam oni aludas antaŭ ili pri la utilo de Esperanto, estas kuraĝigo konstati, ke la plej gravaj estroj sur la tero aprezas nian strebadon al la disvastigo de la uzado de Esperanto en la internaciaj rilatoj. Ni povas nur ĝoji pri tio kaj senti nin pli firmaj en nia agado. Esperanto estas nun pli ol 100-jara; ĝi disvastiĝis sur la kvin kontinentoj kaj ĉiutage pli kaj pli da homoj ĝin parolas. Libroj eldoniĝas, revuoj aperas kaj la Esperanto-parolanta mondo estas fakto, kiun negas nur tiuj, kiuj ŝtopas siajn okulojn por ne vidi.

Tio signifas, ke, tute ne perdante la kuraĝon, ni devas malo daŭrigi nian laboron por disvastigi la uzon de la Lingvo Internacia, ĉefe en la kristanajn mediojn, kaj por ĝi helpi al la okesto de paca unueco inter la popoloj.

A.B.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## NI AGU EN KRISTO

Kristo ne havas manojn
Li havas nur niajn manojn
Por plenumi Lian hodiaŭan laboron.

Kristo ne havas piedojn
Li havas nur niajn piedojn
Por gvidi la homojn sur Lia vojo.

Kristo ne havas lipojn
Li havas nur niajn lipojn
Por paroli pri Li al la homoj.

Ni estas la sola Biblio,
Kiun la publiko ankoraŭ legas;
Ni estas la lasta mesaĝo de Dio
Verkita pere de agoj kaj paroloj.

Anonimulo

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## FINANCA RAPORTO POR LA JARO 1993

| ENSPEZOJ | | ELSPEZOJ | |
|---|---|---|---|
| Kotizoj | 4 440,00 | Bulteno | 2 [illegible]2,80 |
| Donacoj | 700,00 | Korespondado | 939,00 |
| Rentumo ŝparkaso | 501,11 | Kovertoj | 640,44 |
| Pilgrimo Lourdes | 21 728,00 | Vojaĝoj komitatanoj | 1 739,00 |
| Kongreso Metz | 1 700,00 | Kunveno Paris | 200,00 |
| Jubileo Bourdon | 2 220,00 | Pilgrimo Lourdes | 23 510,00 |
| | | Jubileo Bourdon | 2 220,00 |
| | | Poŝta takso | 5,00 |
| | 30 889,11 | | 32 152,24 |
| En la kaso la 1,1,93 | 28 143,68 | En la ŝparkaso | 11 636,91 |
| Negativa saldo: | 1 265,13 | En la p. ĉ. k. | 15 243,64 |
| En la kaso la 31/12/93 | 26 880,55 | | 26 880,55 |

## AGADRAPORTO PRI LA JARO 1993

La jara kongreso okazis en la kadro de nia pilgrimo al Lourdes fine de aprilo 1993. Dank' al la ĉeesto de kvar alilandanoj, la pilgrimo alprenis internacian etoson. Ni vizitis la tombon de P-ro Peltier, nia fondinto, kaj kune preĝis apud ĝi. Ni estis ankaŭ akceptitaj en la Hejmo S-ta Petro, kaj tiel estis bone informitaj pri la agado de la franca katolika helpasocio. Ĉiutage ni havis diservon en la baziliko, kaj dimanĉon matene, ni havis ĝin en la groto mem, kie Maria aperis al Bernadette. Estis por ni granda ĝojo.

Okaze de nia kongreso, ni sendis al la episkopo de Tarbes kaj Lourdes diversajn dokumentojn por informi lin pri Esperanto kaj nia agado.

Artikolo pri "Esperanto kaj katolikoj" aperis en la Normanda Bulteno kaj vekis intereson.

Dank' al la akurateco de F-to Marmou, nia diligenta presisto, kaj la senlaca laboro de S-ino Vincent, nia redaktorino, la asocia bulteno regule aperis.

Pluraj el niaj membroj partoprenis la Ekumenan Kongreson en Viviers, kie kunvenis dum unu semajno en frata etoso protestantoj kaj katolikoj.

Dum la pasinta jaro, ni bedaŭrinde funebris pro la forpaso de niaj fidelaj membroj S-ino Apollo (Estonio), F-ino Vanneau (Nevers) kaj S-roj Bachelier (Paris), Dabezies(Paris) kaj Fardet (Nantes).

Nia membraro malkreskis: 156 en 1992 kaj nur 145 en 1993. Varbado de novaj anoj nepre necesas.

A. B.

Rimarko de la redakcio: se ĉiu membro abonigus 1 aŭ 2 alilandajn korespondantojn la membronombro rapide kreskus.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## PROTOKOLO DE LA LASTA KOMITATKUNVENO

La kunveno okazis merkredon 19-an de januaro 1994 en la monaĥejo S-ta Jakobo, 20, rue des Tanneries en Paris.

Partoprenis: P-roj Bourdon kaj Héroux, F-to Marmou, S-ino Vincent, S-roj Bessière, Colas, Despiney, Lafargue, Pons kaj Villeneuve.

Petis senkulpigon: F-ino Preux, malsana.

Observis: S-ino Lafargue.

La programo de la venonta kongreso en Moulins-les-Metz estas preta kaj la kongrestemo elektita: Paco por la komuna pozitiva kontribuo de la religioj. Rolo de Esperanto, universala lingvo, en la disvolviĝo de tiu agado.

La prezidanto informos la episkopon en Metz.

En 1995, la kongreso okazos en Limoges en majo en la urba seminario. En 1996, nia asocio partoprenos la tutlandan kongreson en Lyon.

La kasistino prezentis la financan raporton pri 1993 (p. 5). La financa stato estas bona kaj ebligos la eldonon de nova varbilo, kies teksto estas verkita kaj aprobita. Oni kompletigos ĝin per taŭga ilustraĵo kaj petos la kutiman presiston presi ĝin en 2 000 ekzempleroj.

Post favora artikolo pri Esperanto en la gazeto de Pax Christi, pluraj personoj skribis al nia asocio por peti informojn pri la lingvo kaj nia agado; ĉiuj ricevis taŭgan respondon.

Pluraj anoj de nia asocio jam decidis partopreni la venontan ekumenan kongreson, kiu okazos en Gostyn (Pollando) de la 9-a ĝis la 16-a de junio 1994.

Pro la samtempeco de nia kongreso kun tiu de U.F.E., ne eblos organizi diservon en Agde.

La venonta komitatkunveno okazos lundon 16-an de majo 1994 en Moulins-lès-Metz, kadre de la kongreso.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## NIA MEMBRARO

Novaj anoj 1994: 1. P-ro ANDREONI (Tajlando); 2. S-ro BODE (Germanujo); 3. S-ro BANIULAITIS (Litovio); 4. S-ro ALBU (Rumanujo); 5. S-ro MARTIGNON (Essonne); 6. S-ino PERRINEL (M & L); 7. F-ino VILLANOVA (B-du-R); 8. S-ino BERTHAUX (Indre)

Plej koran bonvenon al ili!

Membroj bonfarantoj: 1. S-ro BESSIERE (S-M); 2. S-ro SANSON (Essonne); 3. S-ino GILLES (B-Rhin); 4. S-ro LECOCQ (I & L); 5. S-ino LAFARGUE (V. Marne); 6. S-ino

GUILLOT (Oise).

Dankegon al ili pro ilia grava helpo!

NEKROLOGO: nia fidela membro J. DUYELLE perdis ŝian edzinon en novembro. Ni preĝu por la ripozo de ŝia animo.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## LA PACO TRA LA ĈEFAJ RELIGIOJ

1. "VIDI": multaj militoj okazas pro la diferencoj inter la religioj (kristanismo, budhismo, islamo, k.c.) aŭ inter la eklezioj (katolikismo, protestantismo, ortodoksismo)
2. "JUĜI": kio, en la diversaj religioj kaj eklezioj, estas aŭ almenaŭ povas esti kaŭzo de miskompreno, de malamikeco kaj eĉ de milito. En la homa historio, ni havas bedaŭrinde multajn ekzemplojn...
3. "FARI": mencii la multnombrajn manierojn agi por la paco, interalie ĉe la agoj kaŭzantaj militon: trafiko de armiloj, malpravaj atakoj... Anstataŭ ĝemi post kiam okazis la malfeliĉo, pripensi, kiam ankoraŭ eblas, plibonigi la vivkondiĉojn.

AVERTO: ni havas multajn "bonajn motivojn" por nek vidi, nek juĝi, nek ion ajn fari. Tion klarigu!

Ni havas ankoraŭ pli multajn motivojn por forte agi, laŭ tiuj tri manieroj. Tion klarigu!

LEGOTA LIBRO: "Le livre des religions". Ĝi estas agrabla, mallonga, kun multaj esprimplenaj kaj koloraj ilustraĵoj. Prezo: 98 F. Ed. Découverte Cadet Gallimard.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## LETERO EL RUMANUJO

En 1993, la rumana IKUE-sekcio havas 82 membrojn. La 3-an de julio, ĉe la romkatolika paroĥejo, en la vilaĝo Vintu de Jos (legu: Vincu de Ĵos), distrikto Alba, ni havis la 2-an renkontiĝon, kie partoprenis 40 IKUE-anoj, inter kiuj Sac. Lajos Kobor el Hungario, vicprezidanto de IKUE. La temo de la renkontiĝo estis "Ekumenismo kaj esperantismo", pri kiu prelegis V. Albu. La renkontiĝo komenciĝis en la preĝejo, kie tri pastroj: Deziderio Teleky, Lajos Kobor kaj Zakarias Vizi celebris esperante sanktan meson kaj predikis. Poste, en la fama kaj luksa domo "Pongr cz", apud la preĝejo, okazis la kunveno. Oni elektis novan estraron; mi estas komitatano, landa reprezentanto de IKUE. Dank' al monhelpo de la paroĥanoj de P-ro D. Magnani el Rimini, oni povis pagi al ĉiuj partoprenantoj veturadon, loĝadon kaj manĝojn.

La venonta renkontiĝo okazos en junio 1994. Promesis ĉeesti Sac. D. Magnani, prezidanto de IKUE kaj sac. Mubarock Amar-Amar, estro de la Amerika Katolika Esperanto-Asocio.

V. ALBU

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## ĈU "PATRINO DE DIO?"

La titolon "Patrino de Dio" oni kontestas. La protestantoj konsentas diri "Patrino de l' Kristo", patrino de l' Savanto", sed ili ne ŝatas diri "Patrino de Dio", ĉar ili trovas tiun terminon dubasenca. Koncerne la Atestantojn de Jehovo, ili energie rifuzas tiun titolon. Iun tagon mi demandis malsanulinon de tiu sekto: "Ĉu vi preĝas al la Sankta Virgulino?" Ŝi rebatis al mi per kruda tono: "Unue, ŝi ne estas virga! Due, ŝi ne estas patrino de Dio!... Ĉu vi aŭdacus firme aserti, ke ŝi estas patrino de Jehovo? Tamen!" Laŭ ili, Jehovo estas la ununura Dio en unu sola persono; estas neniu Trinitato, do neniu eterna Filo de Dio kaj neniu Dio fariĝinta homo.

La katolikoj, eĉ ne tre kleraj, ja scias, ke Maria ne estas la patrino de Dio Patro, nek de la eterna Filo tia, kia Li estas en sia dia naturo, sed ke ŝi estas la patrino de la Dio fariĝinta homo, al kiu ŝi donis homan naturon por ke Li povu esti la Savanto de la homoj. Ŝi do estas "la homa patrino de iu, kiu estas Dio" dum li ankaŭ estas homo; ŝi estas la patrino de la "Homo-Dio".

el "La Rédemption" de P-ro Charles Sauteur

LA KRISTANA ORIENTO (daŭrigo) el "Bulletin de l' Oeuvre d' Orient nº 684 20, rue du Regard 75006 PARIS)

El la mezepoka Oriento atingas nin precizaj atestoj pri la komuna restado de la S-ta Virgulino kaj S-ta Johano en Efeso.

Jene skribas la jakobita patriarĥo de Antiocho, Miĥaelo la Siriano, kromnomita la Granda (1126-1199):"Johano predikis en Antioche kun Simono-Petro; poste li foriris al Efeso kaj la patrino de Nia Sinjoro akompanis lin... Tie li entombigis la Beatan Marian".

Simile atestas unu el liaj posteuloj, Gregorio Abul Faraj-Bar Hebreo (1226-1286), kromnomita "Bar-Hebraeus".

Fine, Denys Bar Salibi, episkopo de Amida, hodiaŭ Dujarbakir, skribas en 1171:"La Virgulino mortis en Efeso. S-ta Johano kaj liaj disĉiploj tie entombigis ŝin".

La konvinkojn de tiuj siriaj aŭ ĥaldeaj episkopoj akceptas ne ĉiuj orientaj kristanoj. La bizanca Eklezio, ekz, akceptas malfruan tradicion - el la VII-a jc; - laŭ kiu la "Endormiĝo de la Virgulino", laŭ la greka esprimo, estus okazinta en Jerusalemo.

Sed tiun tradicion, kiun apogas neniu kontrolebla ekpruvo, oni devas forĵeti pro niaj nunaj scioj.

Cetere rimarkindas, ke S-ta Jeromo, kies aŭtoritato estas nekontestebla, ĉefe pri la detaloj de la topografio de la S-ta Tero en la IV-a jc., neniel aludas pri la Maria tombo en tiu regiono.

Male, dum la restado de S-ta Jeromo en Oriento, la Panagia de Efeso jam ekzistis.

Inter la forfuĝintoj, kiuj forlasis Jerusalemon en 42, forpelitaj de la persekutado de Herodo Agrippa, nepre troviĝis S-ta Johano, kiu, dezirante certigi la sekurecon de sia adopta patrino, havis unu solan eblecon: konsili al Maria, ke ŝi sekvu lin sur la vojo al libereco, tiam sola vojo ebliganta evangelizadon...

La Agoj de la Apostoloj sciigas al ni, ke Antioche estis grava kuniĝpunkto por tiuj unuaj kristanoj forfuĝantaj el Jerusalemo post la martiriĝo de S-ta Stefano. Cetere, ja en Antioche, la unuan fojon, oni nomas "kristanoj" la disĉiplojn de l' Kristo Jesuo.

Laŭ Miĥaelo la Siriano, la Virgulino Maria kaj S-ta Johano instaliĝis en tiu urbo ioman tempon post sia foriro el Jerusalemo. Des pli verŝajna estas tiu hipotezo, ke Antioche, dank' al sia privilegia geografia situo - ligilo inter la maro kaj la mezopotamia altebenaĵo -, ankaŭ dank' al sia rango de ĉefurbo de la siria romiana provinco, estis uzota kiel deirpunkto por la maskiĝanta kristanismo.

Eblas do supozi, ke de Antioche S-ta Johano foriris por plenumi sian apostolan mision en Azio.

Per tiu nomo "Azio", oni tiam difinis tiun vastan "senatan" provincon de la romiana imperio, kies guberniestro, konsulo, loĝis en Efeso, unu el la plej famaj metropoloj en la antikva mondo.

Por atingi tiun ĉefurbon ekde Antioche, la plej rapida, plej komforta, eĉ malplej kosta, estis la "mara", verŝajne elektita de S-ta Johano.

(daŭrigota)

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

MESAĜOJ EL LA ĈIELO

Depost la 24-a de junio 1981, la S-ta Virgulino aperas en la vilaĝo Medjugorje en Jugoslavio. Ŝi aperas ĉiutage al kvar gejunuloj. Ŝi preĝas kun ili por la paco en la mondo kaj por la pilgrimantoj, kiuj venas al Medjugorje. En siaj mesaĝoj, ŝi pritraktas multajn pliajn temojn. Jen tio, kion ŝi diras al ni pri la infero kaj la purgatorio:

"La homoj, kiuj venas en la inferon, ne volas plu ricevi iun ajn bonaĵon el Dio, ili ne pentas, ili daŭre sakras kaj blasfemas, ili decidas vivi en la infero kaj tute ne planas forlasi ĝin".

Pri la purgatorio:"Tie estas diversaj niveloj, el kiuj la plej malaltaj proksimas al la infero kaj la plej altaj grade proksimiĝas al la ĉielo. Ne en la Tago de la Mortintoj, sed en la Kristnaska Tago, la plimulto de la animoj forlasas la purgatorion. Iuj animoj arde preĝas al Dio, sed neniu parenco aŭ amiko preĝas por ili sur la tero. Dio profitigas ilin de la preĝoj de aliaj personoj. Foje, Dio permesas al ili manifestiĝi diversmaniere ĉe siaj familianoj sur la tero por memorigi al la homoj la ekziston de la purgatorio kaj petegi iliajn...

preĝojn al Dio, kiu estas justa sed bona. La plimulto de la homoj venas en la purgatorion, multaj venas en la inferon; malgranda nombro iras senpere al la ĉielo".

**********************************************************************************

PRI NIA BULTENO

Dronante inter multaj revuoj aĉetitaj de mia edzino, de miaj gefiloj, de mi mem, modesta bulteno surteriĝas sur mian skribtablon. Neniu en tiu bulteno flatas la okulojn, nek belaj koloraj bildoj montrantaj la lastajn lamodajn sekretojn, nek kliŝoj pri allogaj filmoj, nek la taga horoskopo, kiu donas tiom da altprezaj konsiloj, nek medicinaj aŭ kuiradaj receptoj. Sed, dum foliumado de la bulteno, preĝo frapas la okulojn kaj alfluas al la spirito:

"Montru vin, Sinjoro..." (de S-ta Aŭgusteno)

Tiam, iom post iom, la preĝo invadas la animon; ĉio lumiĝas, kiel fulmo ĉiuj tagaj klopodoj, ĉiuj zorgoj svenas. Nenio plu gravas, krom la sankta dia parolo, kiu ŝprucigas la amfonton. La murmuro de la preĝo iĝas pli kaj pli elokventa, pli kaj pli penetranta... La ĝojo sin instalas. Gloron al Dio!

Jen kio motivigas nian modestan "Franca Katolika Esperantisto"-n. Aldonu al tio tiujn amikajn zorgojn pri niaj fratoj.

Unuvorte, nia bulteno ne estas revuo aŭ simpla distra legado, sed amkanto al Dio kaj al niaj fratoj.

A. SCICLUNA (Collioure)

**********************************************************************************

HODIAŬAJ PREĜOJ

ESPRIMO DE KREDO: Mi kredas je vi, Dio de amo. Vi estas unu sola Dio, sed vi revelaciis vin Patro, Filo kaj S-ta Spirito. Farante min via infano per la bapto, vi partoprenigas min en via vivo, en Eklezio. Fortigu mian fidon en via parolo kaj faru, ke mi agu en ĉio kiel via Filo Jesuo Kristo, nia Sinjoro.

ESPRIMO DE ESPERO: Mi esperas en vi, Dio de amo. Al ĉiuj, kiuj amas vin, vi promesis la ĉeeston de la S-ta Spirito. En la malfacilaĵoj de la vivo kaj en la horo de la morto, fortikigu mian konfidon en Tiun kiu donas la eternan vivon per sia morto kaj sia releviĝo, via Filo Jesuo Kristo, nia Sinjoro.

ESPRIMO DE AMO: Mi amas vin, Patro, senmezura Amo, ĉar vi amis min la unua. Via Spirito kreskigu en mi la amon kaj igu min ami ĉiujn homojn kiel Tiu, kiu ĝisfine amis ilin, donante sian vivon sur la kruco, via Filo Jesuo Kristo, nia Sinjoro.

ESPRIMO DE PENTO: Patro, Dio tenera kaj kompatema, mi pekis kontraŭ vi kaj miaj fratoj. Mi ne estas inda esti nomata via infano, sed apud vi troviĝas la pardono. Akceptu mian penton. Via Spirito donu al mi la forton por vivi laŭ via amo, imitante Tiun, kiu mortis pro niaj pekoj, via Filo Jesuo Kristo, nia Sinjoro.

**********************************************************************************

INVITOJ

1. JUNULARA KATOLIKA RENKONTO kaj 3-a konkurso de esperanta-katolika "Poezio kaj kanzono" de la 11-a ĝis la 13-a de junio 1994 en BYSTRZYCA (Pollando). Senpaga loĝado kaj manĝado. Informas: V. Mistlinski st. Rodzinna 1, 903 57-300 KLODZKO
2. 13-a Internacia Literatura Forumo de la 2-a ĝis la 6-a de julio 1994 en BRATISLAVO (Slovakio). Informas: Esperanta PEN-Centro H-1581 BUDAPEST Pf. 117
3. EUROPA ESPERANTO-FESTIVALO de la 9-a ĝis la 15-a de julio 1994. Informas: Hungaria Esperanto-Asocio H-BUDAPEST Pf. 193.

**********************************************************************************

POR BONE PREPARI LA KONGRESON EN METZ

Estus utile legi la jenajn librojn:

A. Projet d' éthique planetaire; la paix mondiale; pour la paix entre les religions, de Hans Küng Ed. Seuil

B. Je la flanko de la profeto, de Italo Chiussi.

C. Le livre des religions: legu aparte "Christianisme" p. 146 ĝis 161
"Plan" p. 182 ĝis 197.

## RENOVIGO DE 1/3 DE LA KOMITATO

Instrukcioj por la voĉdonado:

1. Respondu la demandojn 1 kaj 2 sur la voĉdonilo ĉi sube.
2. Enmetu la voĉdonilon (eventuale ankaŭ la rajtigilon) en koverton, sen indiko.
3. Enŝovu ĉi tiun en alian, kiun vi sendu al la sekretariino, F-ino Preux, antaŭ la 31-a de marto. Dorse de tiu dua koverto, skribu vian nomon.

N.B. Ne sendu ion plian en ĉi tiu koverto, ĉar oni malfermos ĝin nur en Metz, dum la kongreso!

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## RAJTIGILO

Mi, subskribinto (nomo kaj voknomo)

ne povas partopreni la kongreson en Metz kaj rajtigas

reprezenti min kaj preni mianome ĉiujn decidojn por la bono de F.K.E.A.

Antaŭ la subskribo, Dato kaj subskribo:

skribu mane "Bon pour pouvoir"

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## VOĈDONILO

nepre sendota al F-ino Preux antaŭ la 31-an de marto 1994.

1. Ĉu vi aprobas la agadraporton? (v. p. 3) JES NE SINDETENO (1)
2. Ĉu vi aprobas la financan raporton? (v. p. 2) JES NE SINDETENO (1)
3. Renovigo de 1/3 de la komitato. Estas 4 kandidatoj por 4 postenoj. Vi rajtas forstreki aŭ aldoni nomo(j)n, sed devas esti maksimume 4 nomoj entute.

S-ro BESSIERE Albert P-ro BOURDON Louis

S-ro COLAS René-Claude S-ro DESPINEY Roger

(1) Forstreku la senutilaĵojn.

N.B. Ĉu vi atente legis la instrukciojn por la voĉdonado?

## KASISTINA ANGULO

Se vi tion ankoraŭ ne faris, bonvolu tre atente legi (aŭ relegi) mian alvokon sur p. 8 de la decembra numero. Ĝi restas valida... Jam alvenis februaro kaj proksimume unu triono de la membraro favore reagis al tiu alvoko. Jes, vi bone legis: nur unu triono...

La du restantaj trionoj, kiel kutime, atendas... la rebatleteron. Nu, po 2,40 F, kalkulu mem la (senutilan) elspezon.

Ĉu vi legis la financan raporton por la jaro 1993? Ĉu vi rimarkis la negativan saldon? Nu, ne pligrandigu ĝin per via "forgeso" aŭ pli ĝuste "neglekto".

Ne kredu, ke tia konstanta almozpetado iel plaĉas al mi! Mi dezirus nur, ke vi iĝu iom pli konsciaj pri via respondeco en la disvastiĝo de Esperanto en la religiajn mediojn, ĉar tio ja estas la unua celo de nia asocio.

Ne eblas ion fari sen la apogo de ĉiuj membroj, vi tion bone scias.

Provu ankaŭ varbi pliajn membrojn, kiuj restos fidelaj kaj pligrandigos nian forton. Ek al la laboro, geamikoj!

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

### KOTIZTABELO 1994

| | | |
|---|---|---|
| I.K.U.E. kun "Espero Katolika" | | 150 F |
| Peranto: P-ro R. DEGRELLE p.Ĉ.k. NANCY 2 555 38 L. | | |
| A.C.F.E. kun "Franca Katolika Esperantisto" | unuopulo | 40 F |
| | geedza paro | 50 F |
| infano ĝis 16-jara, pastro, religiul(in)o | | 20 F |
| | bonfaranto | 200 F |
| U.F.E. kun "Revue Française" kaj E° Actualités" | | 270 F |
| U.E.A. kun "Esperanto" kaj Jarlibro | | 300 F |

Association Catholique Française pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2 324 93 N.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

### ENHAVO

1. Le mot du président
2. La bileto de la prezidanto
Ni agu en Kristo
Financa raporto
3. Agadraporto
Protokolo de la komitatkunveno
4. La paco tra la ĉefaj religioj
Letero el Rumanujo
Ĉu "Patrino de Dio?"
5. La kristana Oriento
Mesaĝoj el la ĉielo
6. Pri nia bulteno
Hodiaŭaj proĝoj
Invitoj
7. Rajtigilo kaj voĉdonilo
8. Kasistina angulo

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

Dépôt légal: 1er trimestre 1994 !! Polycopié par l'A.C.F.E.(enregistrée le 6 mai 1977 à la sous-préfecture de Saumur sous le n° 2 525 bis, J.O. 23/05/1977)
C.P.P.A.P. n° 62 532.
Directeur: Albert BESSIERE
Dir-délégué: René-Jean MARMOU
au prieuré St-Martin
77610 LA HOUSSAYE EN BRIE FRANCE